



TEA-BULTENO

21^a JARO - N° 141

JANUARO-FEBRUARO

N.1-2/2018

Ĉian ofendon al homo, pro la fakto ke li apartenas al alia gento, lingvo, religio aŭ socia klaso, mi rigardas kiel barbareco.
Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917)

Serenan kaj Pacan 2018^{an} Jaron

Komence de ĉiu jaro, ĉiu homo emas kaj deziras tutkore eldiri al siaj familianoj, amikoj, kolegoj ktp varmajn bondezirojn plej feliĉa ĵus naskiĝinta jaro. Ĉiu el ni tion esprimas sincere kaj konvinke, kvankam en propra memo ĉiu ja konscias, ke tiaj estas nur belaj vortoj, certe sentoplenaj kaj sinceraj, sed tute senpovaj kontraŭ la malbonaĵoj, la tragikaj mondokazaĵoj, la malsanoj, la senlaboreco ktp ktp. Sed

ĉifoje mi volas, forte volas, kredi, ke tiuj vortoj realigos ĉiajn niajn revojn kaj sopirojn. Ĉar daŭre ni devas esperi, daŭre ni devas fidi, ke ĉio tra la mondo pliboniĝos, ke finfine la homo ekrezonados ne nur per la cerbo sed ankaŭ per la koro... Tion ĉi instruis al ni nia Majstro!

*L' espero, l' obstino kaj la pacienco,
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.*

Via
Elda

Triesta E-Asocio lanĉas la 4^{an} Konkurson pri Pentrado por dulingvaj verkoj Premio "Angelo Soranzo" - Jaro 2018

Art. 1 Partopreno estas senpaga.

La konkurso proponas la temon **Savenda naturo**. La verkoj povas esti realigataj laŭ iu ajn stilo kaj tekniko, escepte de glulaboraĵoj, mozaiko kaj perkomputila grafiko.

Ĉiu verko devas enteni - **sur la pentrita surfaco** - tekston de almenaŭ unu frazo, eĉ se mallonga, rilata al la proponita temo, en esperanto (skribita en verda koloro) kaj ĝia traduko al iu ajn lingvo (skribita en alia ajna koloro). En la Konkurso rajtas partopreni studentoj de Mezgradaj kaj Superaj Lernejoj, publikaj kaj privataj.

Art. 2 Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per nur unu elaboraĵo kun maksimumaj dimensioj: 80x80 cm, inkluzive de la eventuala kadro.

Ĉiu verko devas havi **sur la malantaŭo** la aŭtorajn datumojn kaj la titolon, en iu ajn lingvo (sed en latinaj literoj por facila komprenebleco). Krome, la pentraĵo estu provizita per taŭgaj iloj por simpla alkroĉado surmura.

Art. 3 Art-Komisiono, alcele elektita, distribuos la jenajn premiojn laŭ la sekvaj kategorioj:

Mezgradaj Lernejoj: Kat A - 1^a kaj 2^a klasoj

Kat B - 3^a klaso

Superaj Lernejoj: Kat C - 1^a kaj 2^a klasoj

Kat D - 3^a kaj 4^a klasoj

Kat E - 5^a klaso

Al studentoj de la Mezgradaj Lernejoj:

1^a premio - 40 €

2^a premio - 30 €

3^a premio - 20 €

Al studentoj de Superaj Lernejoj:

1^a premio - 50 €

2^a premio - 40 €

3^a premio - 30 €

Ĉiu partoprenanto ricevos de Triesta Esperanto-Asocio partopren-diplomon.

Art. 4 Triesta E-Asocio retenos la premiitajn verkojn kaj havos pri ili plenan reproduktorajton.

Art. 5 Enskribiĝo kaj transdono de la verko okazos ĉe la sidejo de TEA (via del Coroneo 15, 34133 Trieste - 3a etaĝo) en la vendredaj tagoj, ekde la 19^a horo ĝis la 20.30, de la januara kaj februara monatoj; aŭ oni sendu ĝin poŝte. La verkoj devas atingi TEA-n **ĝis maksimume la 28^a de februaro**.

Art. 6 La ekspozicio de la konkursontaj verkoj okazos ĉe la TEA-sidejo, aŭ en aliaj ejoj ankoraŭ difinendaj, en **marto 2018**.

Art. 7 La premio-disdonado okazos **merkredon la 21^{an} de marto 2018** je la 17^a horo, ĉe la TEA-sidejo, via del Coroneo 15 - 3^a etaĝo.

Art. 8 La nepremiitajn verkojn oni povos repreni fine de la premia ceremonio aŭ dum la **vendredo de aprilo kaj majo 2018, ekde la 19^a horo ĝis la 20h30**. Se je la fino de majo 2018 oni ne kunprenis sian pentraĵon, tiu ĉi iĝos posedaĵo de TEA, kune kun ties reproduktorajto. La verkoj venintaj el eksterlando aŭ aliaj italaj urboj ne estos redonitaj.

Art. 9 La juĝo de la Art-komisiono estas neapelaciebla kaj nekontestebla. La partopreno en la konkurso antaŭvidas la senrezervajn konon kaj akcepton de la regularo, plus la plenigadon de la enskribiĝilo.

Art. 10 Konforme al la leĝo n. 196/03 pri gardado de personaj donitaĵoj, oni certigas, ke ĉiujn ricevitaĵojn oni prikonsideros per la pleja diskreteco kaj, en ĉiu momento, la aŭtoro rajtos peti ilian ĝisdatigon, kontrolon aŭ forviŝon.

Art. 11 La Asocio tenas por si la rajton, akcepti aŭ malakcepti la partoprenon de la prezentotaj konkursaĵoj.

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Regularo kaj aliĝiloj troveblas ankaŭ rete:
www.esperantotrieste.altervista.org


Laste trovitaj!

Barcelono la 20^{an} Aŭgusto 1909^a

Tiu ĉi la dato aperanta sur tre speciala poŝtkarto (=pk), eldonita antaŭ la komenco de la 5^a Universala kongreso en la hispana urbo, de la 4^a ĝis la 11^a de septembro. Sur ĝi aperas la nomoj de du gravaj esperantistoj: la adresito estas Henri Dor el Lyon, Francujo, dum la sendanto Alfonso Sabadell el Barcelono, Hispanujo. Ambaŭ estas tre konataj, kiel scienculo - la unua; kiel sperta tradukisto kaj verkisto en Esperanto - la dua.

La enhavo de la skribaĵo de s-ro Sabadell rilatas la UK-n kaj donas al d-ro Dor klarigojn pri la horaro de vaporŝipo de Barcelono al *Palma de Mallorca*.

Tie ĉi sube estas la bildoj de la pk, fronte kaj dorse.



Pli gravas tamen, ke ni konatiĝu kun ĉi tiuj du eminentuloj. Unue, nia atento iru al Henri Dor. Profesoro D-ro Henri Dor naskiĝis en 1835 en Vevey, Svisujo, kaj mortis en Lyon, Francujo, oktobre 1912. Li estis unu el la eminentuloj en la scienca mondo, speciale en la fako oftalmologia. H. Dor studis medicinon en Zuriko kaj perfektigis kiel okulisto en Vieno (*ndr: samkiel nia Majstro*), Londono, Berlino kaj fine en Parizo. En 1867 li akceptis la inviton de la Berna Universitato okupi tiean katedron, kies rektoro en 1872 li fariĝis. Post kvar jaroj li translokiĝis al Lyon, kie li fondis oftalmologian klinikon, en kiu dum 35 jaroj ricevis sen-


pagan helpon pli ol 35.000 malsanuloj. Li estis prezidanto de kelkaj sciencaj societoj en Lyon: Antropologia, Oftamologia kaj Medicin-sciencia. Bona lingvisto, li parolis kaj skribis 11 lingvojn kaj fine, jam 67-jara, en 1902 iĝis esperantisto.

Kiel povis okazi ĉio ĉi?

Ni lasu Prof. Dor-n mem respondi la demandon: "Vi opinias" diris li al Prof. Èmile Cohendy, juristo, lin salutinta en Esperanto la 24^{an} de marto 1912 dum lia solena jubileo, "ke mi ne bezonis Esperanton por mi mem, ĉar mi konas kelkajn lingvojn. Mi ankaŭ tion opiniis ĝis mi vojaĝis en oriento de Eŭropo, en Aŭstrio, Rumanujo, Turkujo, kie post kelkaj horoj da vagonveturado oni jam parolas alian lingvon. La imperiestro de Aŭstrio devas paroli deksep lingvojn por interrilati kun siaj subuloj, mi mem kvinfoje ne povis kompreni la demandojn, ĉar mi ne konis eĉ unu vorton de bohema, pola, serb-kroata, rumana kaj turka lingvoj. Mi do devis rekomenci studadon de novaj lingvoj, sed ĉar ekzistas 484 nur en Eŭropo, tio ne estis ebla, - nu, mi turnis min al Esperanto kaj la sperto montras, ke per tiu ilo ni povas vojaĝi nun tra la tuta mondo." Fariĝinte esperantisto, D-ro Dor tuj energie ekaktivis kaj jam en aŭgusto 1902 li faris raporton pri Esperanto okaze de internacia medicina kongreso en Bruxelles.


En 1908 dum la Dresdena UK, kiam fondiĝis TEKA (*Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio*), li estis elektita ties ĉi prezidanto: li okupis tiun postenon ĝis sia morto. Li estis ankaŭ prezidanto de la Liona E-Grupo kaj membro de la Lingva Komitato. Li vizitis preskaŭ ĉiujn esperantistajn kaj medicinajn kongresojn ĉiam vigla, vivoplena, agema, laborema kaj energia malgraŭ la aĝo. Kiam en 1911 ĉesis aperi la organo de TEKA, *Internacia Medicino*, li ekeldonis la *Oficiala-n Bulteno-n de T.E.K.A.* Sed tri semajnojn antaŭ la Krakova Kongreso, Prof. Dor ekmalsaniĝis, serioze, kaj lia sanstato ne permesis al li partopreni en la Kongreso. Dum la tuta periodo de malsaniĝo, li ade planis agadojn favore al Medicino kaj Esperanto, legadis, korespondis, sed lia sanstato pli kaj pli komplikiĝis kaj li - 77-jara - forlasis ĉi mondon.

"Liaj vivo kaj agado estu ekzemplo kaj modelo por aliaj sciencistoj kaj esperantistoj" tiel skribis D-ro K. Ŝidlovskij, lia kara rusa amiko, en la decembra ekzemplero de la *Ondo de Esperanto* (1912).



Li estis konata ankaŭ kiel la "patriarko de la dua generacio de esperantistoj".

Kaj nun, mallonge, ĉar ne multajn informoj mi trovis, pri la kataluna pioniro Alfonso Sabadell. Li naskiĝis en 1859 en Barcelono kaj mortis en Italujo, je la 1932^a jaro. Li eksciis pri Esperanto okaze de la propaganda prelego de Vicente Inglada Ors, infanteria oficiro, en sia urbo. Li iĝis la unua esperantisto en Barcelono kaj fondis la unuan grupon en Katalunio, kies prezidanto li estis dum multaj jaroj. Vigla kaj fervora agemulo, s-ro Sabadell propagandis, gvidis kursojn, faris sennombrajn paroladojn kaj verkis artikolojn. Dum la 5^a UK en Barcelono, li estis la vicprezidanto de la LKK. Li estis la sola persono, kiu "posedis" la voĉon de Zamenhof en gramofondiskoj, reproduktitaj el malnovaj vaksaj cilindroj. Bonstilaj kaj facile legeblaj estas liaj tradukoj de verkoj de Santiago Rusiñol, poeto, dramisto, ĵurnalisto kaj pentristo.



.....

Prologo aperinta en la **Folios de la Vivo**

Hodiaŭ kiam per Esperanto, oni povas legi verkojn el plej malsamaj literaturoj, mi kredis necese aldoni Katalunan verkon al ili, ne nur ĉar tio grandigos la nombron, se ankaŭ por diskonatigi nian literaturon.

Ĉar en Kataluna lingvo la ordigo de vortoj estas sufiĉe bone komprenebla por fremduloj, mi tradukis kaj lasis la vortojn preskaŭ same ord-igitajn kiel en la teksto, kaj mi ne dubas, ke oni bone komprenos tiujn ĉi *Folios de la Vivo*-n de nia fama pentristo kaj verkisto San-

tiago Rusiñol, kaj samtempe oni povos juĝi pri lia stilo. Eble oni trovos trouzadon de la artikolo *la*, konjunkcio *kaj*, vortoj *tiuj* kaj *kiuj*, sed mi celis tradukon plej fidelan kiel eble, kaj se mi trafis, jen la rekompenco, kiun atendas

LA TRADUKINTO

.....

Kelkaj aŭtoraj vortoj al **LA LEGANTO**.

[...] Ĉiuj ĉi tie sekvantaj folioj estas nur desegnaĵoj de la estanto, intimaj notoj enmetitaj en la albumo de la vivo, nunaj skizoj, ellasitaj plumoj por ke ornamu siajn flugilojn tiu, kiu pretiĝas ekflugi kaj estas sufiĉe forta por altiĝi; folioj elŝiritaj el proza kalendaro, sensencaj dokumentoj de la arĥivo de la penso, plenpolvaj unuj, aliaj konfuzaj, indiferentaj aŭ maldolĉaj, sed sincere priskribitaj kaj plenaj de amo, pri kiu mi jam parolis." [...]

.....

Kaj fine, el la nekrologo aperinta en *Kataluna Esperantisto*, marto 1932:

"Ni ricevis la doloran sciigon, ke nia malnova samideano Alfons Sabadell mortis en Italujo, kien li transloĝiĝis antaŭ nelonge. Li estis Lingva Komitatano de antaŭ multaj jaroj, [...] lastatempe li transdonis al la *Kataluna Esperantista Federacio* la fonografon kun la voĉo de nia Majstro. Dank' al tio, nia KEF povis eldoni la 50 gramofondiskojn enhavantajn saluton de D-ro Zamenhof al la Barcelonaj esperantistoj kaj dankparoladeton al la aranĝintoj de la Kvina Kongreso.

Kvankam, en la lastaj jaroj, Alfons Sabadell ne aktive partoprenis la movadon - li estis preskaŭ sepdekjarulo -, lia perdo tre plorigas la koron de ĉiuj katalunaj esperantistoj. [...]"

.....

Jen etaj kronikoj pri niaj antaŭuloj, kiuj kuraĝe, obstine kaj pacience, portis fiere antaŭen la esperantan torĉon, por ke ĝi klare lumigu la rektan kaj tre difinitan vojon al la posteularo!

EIDo

Fontoj: EdE; Vikipedio; Kataluna Esperantisto; Ondo de Esperanto

Anonceto el la Japana Revuo 'Verda Mondo'
Februaro 2595 (1935)

★ Samideanoj! Sendu al Esperanta Grupo Cordenons, Udime, Italujo, pupojn en japana kostumo kaj japanajn flagetojn! Vi ricevos intersanĝe pupon en faŝista uniformo aŭ italan flageton!

Japana Anekdotoj - Tri musoj

Superstiĉa princo vidis foje en sonĝo tri musojn: grasan, malgrasan kaj blindan. La princo demandis diveniston, kiu jene klarigis la sonĝon: "La graso muso estas via ministro, la malgrasa estas via popolo kaj la blinda estas via portreto, mia princo." *El 'Verda Mondo', okt. 1925*

Solvo de la kvizo en TEA-Bulteno n-ro 140

Ŝi estas princino Elisabeth Pauline Otilie Luise zu Wied, nomata ankaŭ Elizabeta, reĝino de Rumanio. Ŝi naskiĝis la 29^{an} de decembro 1843, en Kastelo Monrepos apud Neuwied (Germanio); mortis la 2^{an} de marto 1916 en Bukareŝto (Rumanio). Ŝi edziniĝis kun la rumana reĝo Karolo 1^a.

Ŝi uzis la pseŭdonimon *Carmen Sylva*.

Ĉi-foje multajn respondojn mi ricevis, sed el tiuj nur unu estis la ĝusta: denove nia Egle Mongiello sukcesis malkaŝi la misteron! Ŝi ricevos interesan Esperanto-libron!

Varmajn gratulojn al vi, brava solvintino, kaj dankon al ĉiuj partoprenantoj!

Grava novaĵo el Londono: la duetaĝaj busoj estas “nutrataj” per pulvorrestaĵoj de kafo!

De tempo al tempo sensacia informo aperas en la naciaj ĵurnaloj aŭ oni ĝin dissendas radie aŭ televide. Ĉi-foje ĝi rilatas la famajn londonajn busojn. Fakte tiuj veturados danke al eta kvanto da biokarburado eltirata el la kafaj restaĵoj, akumulitaj de kafejoj aŭ aliaj trinkejoj. Bedaŭrinde tiu kvanto ne sufiĉas por plibonorigi la aeron!

Komencis funkcii, ekde novembro pasintjara, jam per tiu nova brulaĵo nomita B20, ĉirkaŭ 9 500 ruĝaj urbaj busoj. Signifoplena rezulto, ĉu ne? **B20** konsistas el 20% da kafeo kaj estis realigita danke al kunlaborado inter *Shell*, *Argent Energy* kaj *bio-bean*, ĉi-lastata brita entrepreno specialigita en evoluado de brulsubstancoj kaj karburadoj devenantaj el la kaforestaĵoj. Tiu ĉi kombinaĵo de mineralkaf-oleoj tute ne necesigas ŝanĝojn en la busaj motoroj kaj liveras pli puran energidonan solvon per la re-

utiligado de materialoj, kiuj alie estus konsiderataj rubaĵoj: ankaŭ pro tio malpliigas la malutilajn elmetojn en la atmosferon.

Biokarburadojn, uzantajn oleon eltiritan el forĵetindaj nutraĵoj, oni jam utilis por



la londonaj busoj, sed unuafoje oni uzadas la kaforestaĵojn, kiuj estas kolektitaj de *bio-bean* ĉe la grandaj komercaj centroj kaj fabrikoj. Poste oni sekigas ilin kaj per alia procedo ekstraktas la oleon. Fine, kune kun la partnero *Argent Energy*, la oleo estas transformita al **B20**.

Ĝis nun estis produktitaj 6 mil litroj da kafeo kiuj, se

utiligataj kiel pura miksaĵo por la biokomponaĵo de la motorturaĵo kaj miksitaj kun dizelpetrolo por realigi **B20**-on, povus helpi nutradi unu publikan buson dum tuta jaro.

Laŭ statistiko farita de la Brita Kafo-Asocio, en la lando oni konsumas ĉirkaŭ po 55 milionojn da kafej tage, kio egalas al kvazaŭ 21 miliardoj jare. La fondinto de *bio-bean*, Arthur Kay, asertas, ke “ni eklaboris en Britujo, sed imagu, kion ni povintus fari en lando kia Italujo, kie la konsumado de kaf-tasetoj egalas al pli ol 39 miliardoj jare. Renovigante la tutan sistemon pri liberiĝo je rubaĵoj en la tuta mondo, ni povus krei urbojn kun plibonaj vivkvalitoj kaj malpli kolizio kun la medio, danke al inteligenta utiligado de la ekzistantaj teknologioj, kio certigus pli bonan estontecon por ĉiuj”.

Tradukis kaj kunmetis E.D.

El www.ilfattoalimentare.it

il fatto alimentare

Kio novas en Esperantujo?



Esperanto-Asocio en Aragono
Asociación Aragonesa de Esperanto
Calle Cadena, 20, 1ª Izda. 50001-Zaragoza
fratecoesperanto@yahoo.es

Nova retejo en Aragono!

Aragona Esperanta Societo FRATECO, fondita en 1908 (NdR: *gratulojn pro la ĉi-jara 110^a datreveno!*) en Zaragoza.

Kvankam ankoraŭ la retejo ne estas tute preta, tamen en ĝi aperas multegaj interesaj informoj pri la E-movado en Aragono, ekde la komencaj tempoj: do, entute vizitinda.

Jen la ligilo:

<https://sites.google.com/site/fratecoesperanto/>

La retadreso de la prezidanto Lorenzo Noguero estas:

fratecoesperanto@yahoo.es

Oni atendas vian viziton kaj sugestojn, komenton k.a.



Novaj programoj en Gresillon!

2018-apr-20/28:

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj: gresillon.org/p

2018-maj-09/13: Korusa renkonto de Interkant' kaj Vegana renkontiĝo: gresillon.org/koruso

2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso: gresillon.org/s1

2018-jul-16/21: Turisma semajno kaj Esperanto-kurso: gresillon.org/s2

2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK **ESPERANTO EN ARTOJ**: gresillon.org/s3

2018-aŭg-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj, gresillon.org/s4

Novaj specialaj renkontiĝoj

★ 24^a de februaro – 8^a de marto
TRIA SPECIALA EKSKURSO 2018
Kathmandu, Nepalo.

La ĉefa celo de la programo estas konigi Nepalon kaj nepalajn esperantistojn al la mondo kaj reciproke. Ekskurso okazos al famaj turimaj lokoj, atingeblaj per buso kaj situantaj piede de belaj pejzaĝoj: Katmanduo, Sirubari, Pokhara k.m.a.

Informas: Nepala Esperanto-Asocio, G.P. Box 10518, Kathmandu, Nepalo.

Rete: nespa.1990@gmail.com

★ 18^a – 21^a de marto
TAJVANA FESTIVALO DE LITERATURO KAJ POEZIO – en Tainan, Tajvano. Evento por malkovri Esperante la tajvanan literaturon, renkonti lokajn kaj internaciajn verkistojn, kaj ankaŭ ekskursi!

Org. Cyril Vergnaud. Kontakto: litteraturotw@gmail.com

21^a de februaro

Tago de la Patrino Lingvo

Nelson Mandela diris: "paroli al iu en lingvo de li komprenata, signifas konkeri lian cerbon. Paroli al iu en lia patrino lingvo, signifas konkeri lian koron."

La lingvo de niaj pensoj kaj de niaj emocioj estas do nia plej valora trezoro. Por konstruado de aŭtentika dialogo oni devas respekti ĉiujn lingvojn: la lingvo estas tio, kio ni estas, protekti ilin signifas protekti nin mem.

El la pli ol 6 000 lingvoj parolataj en la tuta mondo, preskaŭ la duono riskas forviŝiĝon el la planeda surfaco, ene de kelkaj jardekoj. Malapero de eĉ ununura lingvo signifas gravan perdon por la tuta homaro, plian paŝon malantaŭen en la defendo de la rajto de ĉiu ajn esti aŭskultata, kleriĝi kaj komuniki.

Ĉiu lingvo kunportas kun si valoregan kulturan havaĵon, kiu pliigas la kreeman diversecon de la homo. Kultura diverseco estas grava, tre grava, tial ni devas defendi kaj la lingvojn kaj iliajn parolantojn, por subtenebla evoluado kaj por unueco en diverseco. La rajto esprimiĝi en propra lingvo estas la baza fundamento de libereco kaj egaleco por ĉiu homo.

Tutmondiĝo kaj utiligado de unu nacia lingvo povas endanĝerigi la ekzistadon de la aliaj lingvoj, kiuj riskas iom-post-ioman foriĝon kaj fine formorton.

Ĉiu rajtas lerni la patrino lingvon [...] vera edukado ne eblas per fremda medio [...] sole la hejma medio povas stimuli spiritan originalecon en la plej multaj personoj.

Mahatma Gandhi (1920), Young India
... kaj la internacian lingvon [...] La lingvo internacia (Esperanto) deziras nur doni al la homoj de malsamaj popoloj [...] la eblon komprenadi unu la alian, sed ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj.

Lazaro Ludoviko Zamenhof (1900), Pollando.
Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia.

Ankaŭ Triesta Esperanto-Asocio intencas ion organizi por celebri tiun gravan daton. Vi estos informitaj ĝustatempe, rete, telefone aŭ poŝte, pri dato, horaro, loko ks.

Aforismoj

Ĉe la plej gravaj vojkruĉiĝoj de la vivo, ne estas vojmontriloj. *Ernst Hemingway (1899-1961)*
Ĉiam pardonu viajn malamikojn: nenio pli ol tio ĉagrenas ilin. *Oscar Wilde (1854-1900)*
Iluzioj ankoraŭ daŭras, spite racion kaj scion. *Giacomo Leopardi (1798-1837)*

Programo - Januaro 2018

5a, vendredo	20h00 - TEA en interreto
8a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: pri la 4a Pentrokonkurso
9a, mardo	Prezento de unuagrada kurso
12a, vendredo	20h00 - Provoj pri legado kaj komprenado
19a, vendredo	20h00 - El malnovvegaj ĵurnaloj
26a, vendredo	20h00 - Ni planu kune niajn estontajn programojn

Programo - Februaro 2018

2a, vendredo	20h00 - Bildoj pri <i>Basilicata</i>
7a, merkredo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO
9a, vendredo	20h00 - Kuna legado de SOVAĜA ĈEVALO, kroata infanliteraturaĵo
16a, vendredo	20h00 - Ĉu ni krucvortumu?
18a, dimanĉo	10h00 Ĝenerala TEA-Asembleo Sekvos komuna tagmanĝo
23a, vendredo	20h00 - Famaj Esperanto-pioniroj



Forgesita letero

Klaus renkontis matene sian najbaron Stein:
- Pro kio via edzino hieraŭ vespere tiel kverelis?" Stein: - Pro letero. Klaus: - Ĉu vi forgesis forsendi ĝin? Stein: - Ne, mi forgesis detruigi ĝin!
Max el Ĉeĥujo

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunvenntagoj: vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 18^{an} de februaro 2018 je la 10h00, unua kunvoko, kaj je la 10h30, dua kunvoko.** Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro da partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj la sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2017:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Edvige Ackermann*)
 - ĉ) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Giuseppe Valle*)
 - d) Raporto de la triesta katedrestro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 18^{an} de februaro 2018.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone!

Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abon-ojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn al LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).